

Popola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŝISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA VALENCIA (Hispanio)
 REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25

NOVEMBRO! Tra pompa turno de lirika frazo

La melankolia monato dediĉita al la mortintoj montras reliefan ĉapitron de nia milito. En ĝia 7.^a tago, antaŭ unu jaro, la «nacia» faŝismo — amasego da maŭroj kun la unuaj italoj — sukcesis puŝi la tiamajn respublikajn milicianojn ĝis la perono de Madrido; estis krepuske, la eniro ŝajnis facila, tamen la malamika stabo kredis prudente k pli oportune atendi la tagiĝon por la triumfa konkero de la deziregata ĉefurbo. Sed la pretendemaj planoj krevis. La popolo de Madrido streĉis la fortojn k ŝlosis la pordon al la invadinto. Sindikatoj k partioj vokis urĝe siajn membrojn al plenumo de plej grava ofero: tiu de la vivo! Entuziasme respondis partianoj k sindikatanoj al la drasta voko. Ĉiuj estis pretaj bari, per sia korpo, la vojon al la sovaĝaj hordoj. En tiu decida epizodo, ludis gravegan rolon la malmultaj internaciaj volontuloj, kiuj tiam deĵoris en Madrido; ili donis instrue sian militan sperton al la bravaj — sed mallertaj pri manipulo de fusilo — laboristoj. Kaj post unu nokto sen paŭzo, en febra sindono al la gloro — al la morto, por la vivo! — la vojo estis ŝtopita, k ŝtopita ĝi restas ankoraŭ, pli obstine ol ĉiam, en freŝa la frosta Novembro, kiu hodiaŭ komencas!

En memoro al tiu legio da malaperintaj fratoj, en honoro al ili, ioniete mistike, ni volas koncentrigi pensojn, dum la tradicia tago — hodiaŭ! — kiam la vivantoj meditas pri mortintoj tra la paco de tombejo preter vico de cipresoj.

Por tre rigora supera idealo, oni oferis senplende, en plena radiadanta juneco, siajn privatajn iluziojn, esperojn k revojn. Sub tavolo el tero fermentas la karno, kiu tremis pro justa kolero k vibris pro am' ĉe la kiso de dolĉa k bela amatino.

Ankaŭ esperantistoj... Funebras, jam tro ofte, la nigraj kadroj por nekrologoj. Se kreskas la truoj de niaj vicoj, ni devas masoni ilin per duobla aŭ triobla laboro, por honoru praktike la nomojn de ĉiuj niaj kolegoj, kiuj certe mortis por alproksimigi, kun la venko de libero, la venkon de Esperanto!

Estu ni fieraj, pro tio, ke verdaj steloj brilis kvinpinte sur la uniformo de multaj protagonistoj, en la plej reliefa ĉapitro, kiu okazis, ĉe la pordo de Madrido, dum pasinta jaro, en la 7.^a tago de Novembro, monato melankolia dediĉita al la gloro de mortiintoj!

La ĉhoj de du diskursoj ankoraŭ ŝvebas tra la aero internacia. Du oratoroj koincidis nur en la samtempeco. Daladier, ministro por Nacia Defendo de Francio, en la Komerca Foiro de Lille; k Mussolini, tirano de Italio, en la Forumo de Romo. Unu, antaŭ la kongresanoj de la franca radikal-socialismo; alia, antaŭ la faŝistoj solenantaj la XVI. datrevenon de tiu hontiga komedio, kiu estis la marŝo al Romo.

Ĉirkaŭ la itala diktatoro, ululis amaso spicita per diabla frenezo k malnobla apetito. Miloj da nigraj ĉemizoj; multaj el ili sidantaj jam en la buĝeta festeno; ankoraŭ pli multaj avide atendantaj vakan lokon sur iu seĝo. Inter unuj k aliaj, aperis la germanaj delegitoj, kiel fanfaronaj pavo, k la gapaj senditoj de la «naciista» Hispanio, kiel indiĝenaj kolonianoj, kiuj lernas tributari vasalecon al siaj novaj mastroj. La aplomba histriono parolis emfazante sian «gloran revolucion movadon, kiu likvidis la erarojn de putranta parlamentismo». Li salutis la naci-socialismon de Germanio k aŭguris la pacon, laŭ faŝista metodo, per ultimato al la mondo.

Preskaŭ samtempe, Daladier oratoris antaŭ vigla samideana rondo de gajaj kongresanoj. Lia partio defendas la socian harmonion k ŝirmas la progreson, la demokration k, antaŭ ĉio, «la superajn interesojn de Francio». Li varme pledis por la popolfrota koalicio, vundita de pli ol unu kongresano. Li konsideras katastrofa ĝian detruon ĉar tio malproksimigus, de la ŝtata respondeco, la proletajn amasojn. Finfine, li ektuŝis la brulaĵon, parolante pri la internaciaj danĝeroj. Tiam, bukedo el skulptindaj frazoj ŝprucas tra la salono k ornamas la kunvenon: «Francio garantias pri sia sendependeco k libero. Francio ĉiutage estos pli potenca. Malfeliĉa lando — li substrekas — tiu, kiu estas malforta k sen taŭgaj armiloj!»

Frazoj en Romo k frazoj en Lille, kun reliefa diferenco: tiuj bleke prononcitaj en la Forumo havas eskorton de obusoj, kiuj eksplodas en Hispanio; tiuj aliaj, lirike sonorantaj en la Komerca Foiro, nur koketas pri la naivaj aplaŭdoj de kelkaj centoj da civitanoj. Intertempe, sub la griza ĉielo de Londono, sinjoro Eden, dando de Britio, en ofico de modesta tajloro, flikas k reflektas obstine la ĉifonojn, kiuj celas doni ŝajnon de ekzisto al la malpuraj kalsonoj de la ne-interveno; de la «NE» interveno!!

- Antaŭ ne multaj tagoj; eble, antaŭ ne multaj horoj, la franca Registaro devis kalkuli pri longaj mezuroj k pensi pri gravaj decidoj. Fortoj «nekonataj» faligas ĝiajn aviadilojn k dronigas ĝiajn ŝipojn. Strangaj devizoj malkvietigas ĝiajn koloniojn; misteraj rifoj kreskas sur la vojo de ĝiaj komunikoj... Por sendependeco k libero de Francio, oni devis nepre decidi energie pri agoj. Sed, en tiu solena momento, nur oko da voĉoj akceptis kuraĝe solvi la problemon. Tio ne estas jam sekreto en la diplomataj kluboj. La voĉoj estas ties: Blum, Auriol, Viollette, Delbos, Cot, Monnet, Campinchi k Moutet; en la listo ne dancas la nomo de Daladier, ministro en Francio por ĝia Nacia Defendo. La herceco aperas pli facila, por multaj personoj, tra pompa turno de lirika frazo. Kvankam, bedaŭrinde, la liriko ne sufiĉas por bremsi la galopon de modernaj despotoj, kiuj ne ŝatas la poezion k preferas fidi pli je la eksplodo de bombo, dum atako al civila loĝantaro, ol sonĝi, pro petoloj de raketo, dum kermesa artofajraĵo.

«Malfeliĉa lando, tiu, kiu estas malforta!» Jes, pravas lia aŭtoro. Post tragika sperto, ni, la hispanaj pacifistoj, gardos kanonon sub la lito por ne riski timi je multaj imperialistoj nek bezoni esperi je kelkaj demokratoj.

Sovetio, kun prospero de sia industrio kaj rido de sia popolo, jubileas sanan vivon!
 En la XX.^a datreveno de ties nova ordo, la hispana popolo salutas unu garantion por la paco de la mondo

JAM FRANCIO!

Ne nur la simplaj laboristoj el Francio, per strikoj, komencas zorgi utile pri Hispanio. Ankaŭ ja la tiea proleta esperantistaro konscias pri la rolo de Esperanto al nia afero k organizas planon je praktika apogo por viviĝi voĉon de ĉiuj specifaj Esperanto-bultenoj aperantaj nun en nia lando.

Anstataŭ trumpeti por tiu valora decido, ni simple aperigas ĵus ricevitan leteron, kiu donas al ni la karesan varmon de la franca esperantista popolo. Jen do la teksto, kiu devas esti normo por multaj samlingvanoj el ĉiuj aliaj landoj:

FÉDÉRATION ESPÉRANTISTE DU TRAVAIL

Le Délégué du Comité Fédéral:

ANDRÉ PARIS, 6, Villa Sabot, MALAKOFF (Seine)

Karaj kamaradoj!

Mi ĝojas informi vin, ke la Federacia Komitato de F. E. T. (Labor-Esperantista Federacio en franclingvaj regionoj) decidis alvoki la membrojn de l'Asocio al sin-ŝuldo pri pago de ĉiumonata subteno, fikso de ĉiu laŭ sia pagpovo, por la respublikanaj batalantoj en Hispanio k iliaj esperantaj gazetoj.

Tiu subteno daŭros ĝis post fino de la lukto en Hispanio. Ni petas, ke vi konigu tiun decidon pere de via gazeto al la esperantistaro, k ankaŭ, pere de ĉiuj, al vi eblaj, rimedoj, al batalantoj en Hispanio.

Vi diru al ili, ke ilia nuna heroo lukto ne estos senuila, ĉar ni sentas, ke per ĝia daŭro mem, ĝi iom post iom ĉe iuj profunde plifortigas—k ĉe multaj vekas—senton pri internacia solidareco.

Vi diru al ili, ke pli k pli vekigas konscio en la popolamasoj de demokrataj landoj pri neceso praktike helpi al la k-do, kiuj nun defendas civilizon kontraŭ faŝismon. Vi klarigu, ke eĉ cinika barbareco k pirateco de la faŝistoj helpas al tiu vekigo de sento pri solidareco.

Vi estas viktimoj de la fakto, ke tiu sento ankoraŭ ne forte kreĝis; espereble, ĝi sufiĉe frue k forte estiĝos, por ke la necesa helpo venu al vi. Tion ni kiel esperantistoj per ĉiuj eblaj rimedoj k per Esperanto mem akcelos. Kun nia plej profundkora deziro pri rapida sukceso k saviĝo antaŭ senhontega rabismo!

La delegito de FET-Komitato, A. Paris.

NEKROLOGO

La tragedio de Hispanio forglutas vivon de bonaj kamaradoj k esperantistoj. Dum la daŭro de Oktobro falis heroe sur la batalkampoj jenaj samideanoj:

ARTUR PASCHKES, hungara volontulo, unu el plej fruaj venintoj en defendo de la popolo.

SALVADOR PALOMARES, iniciatinto de la Esperanto-movado en Tabernes de Valldigna (Valencio) li mortis kiel regula soldato en la fronto de Madrido.

LATELTIN, franca volontulo, eks-sekretario de FET-Grupo en Levallois-Perret (apud Parizo) k membre de FET-Komitato. Lia vivo k morto estas modelo por ĉiu progresema esperantisto.

Kun la glora nomo de tiuj ĉi niaj falintoj, en la koro, ni estu ĉiutage pli aktivaj en la plenumo de nia devo. Eternan rememoron ni havu por ilin

Varma Komitato

FARSO EN TRI AKTOJ SEN EPILOGO

AKTO I

LORDO PLYMOUTH.—Sinjoroj: oni devas tuj nepre likvidi tiun aferon pri la volontuloj!

SINJORO CORBIN.—(Al lordo Plymouth): Mia kara Prezidanto: ĉu vi permesas al mi akcepti, kiel miajn, tiujn viajn energiajn vortojn?

LORDO PLYMOUTH.—Bonvolu atendi; mi petos la konsenton al sinjoro Eden. (Telefonante) Aŭskultu: ĉu sinjoro Eden? Jen, la delegito de Francio demandas ĉu li povas akcepti, kiel sian, la deklaron, kiun mi faris je via nomo.

VOĈO DE SINJORO EDEN.—Atendu; mi iras demandi opinion al sinjoro Neville Chamberlain.

LORDO PLYMOUTH.—(Al sinjoro Corbin): Mia kara kolego: bonvolu atendi ĝis voko de sinjoro Eden.

SINJORO CORBIN.—(Energie) Bone, bone...

LORDO PLYMOUTH.—Sinjoro Grandi, vi havas la parolrajton.

SINJORO GRANDI.—Nu, bone; jen ĉio: La Registaro de Mussolini estas jam preta ekzameni la tiklajn, sur la bazo de tre perfekta egaleco.

LORDO PLYMOUTH.—Kio signifas!...

SINJORO GRANDI.—Kio signifas, ke po ĉiu respublika volontulo, kiu retiriĝos, Italio ne sendos pli ol unu solan divizion al Hispanio.

LORDO PLYMOUTH.—Je nomo de la angla Registaro, mi prenas noton, kun plaĉo, pri via laŭdinda klopodo. (Sonoras la telefono) Diru!... ha! ĉu vi, sinjoro Eden?

VOĈO DE SINJORO EDEN.—Diru al sinjoro Corbin, ke li povas akcepti, kiel sian, la deklaron.

LORDO PLYMOUTH.—(Al sinjoro Corbin) Mia kara amiko; vi havas permeson...

SINJORO CORBIN.—(Bruigante pugnobaton sur la tablo) Sinjoroj: Oni devas tuj nepre likvidi tiun aferon pri la volontuloj!

SINJORO GRANDI.—Jes! ne estas do necese paroli plu.

LORDO PLYMOUTH.—(Rigardante la horloĝon) Sinjoroj; mi petas al vi pardonon, sed mia semajna finaĵo komencas post unu minuto; dankon! (Oni fermas la kunsidon).

AKTO II

SINJORO GRANDI.—(Telefonante) Ekscelenca Moŝto! kiom da volontuloj, ni povas konsenti retiri, se ne eblas alio?

VOĈO DE MUSSOLINI.—Ĉu vi konsideras oportune... du mil?

SINJORO GRANDI.—Ho, kiel sindonema vi estas, Ekscelenco! Ili ja ne postulas tiom da!

VOĈO DE MUSSOLINI.—Nu, nu! ni kompensas tion per aldono de pliaj kvar miloj al tiuj dek miloj, kiuj veturos morgaŭ al Hispanio.

SINJORO GRANDI.—Tiel do, konsentite; du mil, ĉu ne?

VOĈO DE MUSSOLINI.—Jes... tia estos la kvanto da italaj vunditoj, kiuj devas enlandiĝi post du tagoj...

AKTO III

(Oni legu la matenajn ĵurnalojn)

Ne ekzistas epilogo. Sed la epilogo venos, kun la neevitebla triumfo de la popolo, kun rajto k pravo. Venko per hispanoj por hispanoj. malgraŭ abomenaj intrigoj de murdistoj je virinoj k infanoj; virinoj k buboj kun sama sango hispana ol tiuj, kiuj, pro vanto k memfiero, ebligis la invadon al la rabemaj armeoj de la despotoj kies gvida celo estas forpreni la trezorojn de Hispanio.

(El la franca gazeto *Le Canard Enchaîné*)

REMEMORO AL GENERALO SEN INSIGNO

Unu jaron daŭras jam la defendo de Madrido, centra punkto de nia speciala lukto. La epopea kontraŭstaro, al tre potenca atakanto, estas plenumita de anonima amaso, kiun oni povas omaĝe precizigi nur per la nomo de kelkaj batalantoj. Unu el ili estis Bonaventuro Durruti, kiu ŝtale forĝita en la vicoj de la anarkismo k C. N. T. sciis apliki la esencon de siaj teorioj al la postuloj de la cirkonstancoj. Tial, li, malamiko de armeo k disciplino—je la servo de la kapitalismo—akceptis, sen duboj, armeon k disciplinon kontraŭ la faŝismo. Aŭtentika popola generalo li estis k, mortinte en la pordo de Madrido, ĉe la fronto de sia brigado, li gajnis prestiĝon por sia doktrino k donis ekzemplon al multaj...



Epizodoj de la Milito

LASTAJ VORTOJ DE TROMPITA FAŝISTO

La epizodo, kiun vi tuj legos, pruvigas ĝis kia grado, malgraŭ la malklereco de multaj soldatoj de la faŝismo, la sento de la malamo al la invadintoj kreskas k sin montras, eĉ en lasta momento, ĉiam kiam tio eblas.

Post unu el ĵusaj bataloj, sur la fronto de rivero Tajo, niaj soldatoj renkontis vunditon, kiun senzorge forlasis la malamiko. Li restis trafita de tri kugloj en la brusto k ne estis eble savi lian vivon. Komence de la ribelo, oni estis diranta al li, ke temis pri savo al Hispanio. Sen ajna politika kulturo, malklera vilaĝano, li fidis al la faŝismo.

—Vi fusilmortigos min ĉu ne?

—li angore demandis.

—Ne! Ni tuj kuracos vin, kio ne estas same—oni respondis.

—Dankon, sed ne estas rimedo por mia stato. Cetere, pli bone estas tiel. Mi estas jam sata de tiu milito, sata vidi tiom da fremduloj en nia lando, sata de tiuj italaj k germanaj faŝistoj, kiuj humiligas nin k estas la absolutaj mastroj...

Oni urĝe kuracis lin plurfoje. Sed la afero estis gravega. Post la lasta fojo, li ne povis paroli. La kuracistoj vidis lin, klopodi por elparoli ion. Kaj antaŭ ol estingiĝi, li skribis sur papero, agonie:

—Kamaradoj, vi estas pravajj...

FRUKTODONA VARBADO

Jen alia anekdoto. Leŭtenanto Antonio Blanco etendis telefonfadenojn laŭlonge de la batalkampo, sub la pafado. Li antaŭeniris en sia laboro malprudente, lasante jam malproksime sian elirpunkton. Li aŭdis voĉojn el soldatoj k kredis sin ĉirkaŭ niaj pozicioj. La oficiro demandis:

—Ĉu vi estas el la 107.^a Brigado?

—Vi estas kaptito. Vivu Franko!

Li levis la brakojn. Oni povas imagi la ideojn, kiuj okupis lian kapon. En tiaj cirkonstancoj, oni pensas al la partio, al ĉio, kio en la menso de ĉiu libera homo formas tiun muregon de l'antifaŝismo, la murego kiu,

trapasanta la tutan Eŭropon, etendiĝas ĝis Ĉinio, kie niaj flavhaŭtaj frattoj batalas sub afiŝo kun la vortoj:

«Vivu la popolo de Hispanio!»

Alvenis faŝista oficiro. Li ordonis iun soldaton zorgi pri la kaptito. Tre baldaŭ ambaŭ interkompreniĝis. La soldato apartenis al iu partio de la Popolfronto, avide li petis pri eblo de forkuro: —Ĉu ni foriras kune?

Ili foriris dumnokte, serĉante niajn liniojn. Foje, de tempo al tempo, ili renkontis soldatojn k la «faŝista» soldato diris al ili: —Venu kun ni!

Dum la batalo daŭris, kvardek



homoj alvenis en nian kampon. La rikolto estis do, fekunde fruktodona.

VORTOJ DE MALJUNULO

La sekvanta epizodo estas rakonto de soldato Rafael Montoro, el la Centra Armeo k propra spertaĵo lia:

Post longa serio da bataloj sur la ĉirkaŭantaj montetoj, ni okupis iun vilaĝon, kiun ekde la komenco de la milito regis la faŝistoj.

Multaj vilaĝanoj, forlasintaj sian hejmon dum la batalado, per foriro al la ĉirkaŭaĵoj, iom post iom revenis. La soldatoj estis lokigataj en la domoj de la vilaĝo k mi, kun du aliaj amikoj, loĝis ĉe kamparanaj geedzoj kun du simpatiaj filetoj k la geavoj.

Oni babilis kun la familio pri la kaŭzo de la milito, pri la estonto post la venko, k. t. p. Nur la avo rezistis akcepti nian entuziasmon ĉar, laŭ li unutone ripetada, «ĉiam estos riĉuloj k malriĉuloj, la riĉuloj ĉiam regos laŭplaĉe k ne eblas aliigi ion sur la Terglobo». Li konas la mondon, pro sia multjara aĝo k li ne akceptas, ke ne ĉiuj homoj estas samaj k ke estas homoj pli bonaj ol aliaj homoj.

Dum kelkaj tagoj ni loĝis tie. La muljunulo observadis nin. Li vidis, ke ni kondutas dece k afable, ke ni donacas al la infanetoj parton de niaj nutraĵoj k de kelkaj frandaĵoj ricevataj el niaj familianoj. Finfine, ni devis foriri. Tiam ni vidis, ke ĉiuj en la domo estas malĝojaj. La avo, kun larmoj en la okuloj, alparolis nin:

—Mi kredis, ke mi pravis pro mia sperto, sed mi konfesas, ke mi eraris. Mia suspektemo pro la propagando farita kontraŭ vi «rugiĵoj», blindigis min k mi estis kaptita de antaŭjuĝoj. Ne ĉiuj homoj estas samaj k mi kredas, ke estos ebla tiu vivo pli bona, pli libera k pli justa, por kiu vi batalas. Sufiĉis al mi kompari vian konduton kun tiu de la «aliaj». Ili estis tie ĉe. Estis strangaj homoj k ili parolis lingvon nekompreneblan por mi. Tamen, ekzistas lingvo, kiun ĉiuj homoj komprenas: la lingvo de la malriĉuloj k de la infanoj, kiuj malsatas. Ili vidis miajn filojn k miajn nevojn, kiuj malhavis ĉion dum ili manĝegis k neniam ili oferis pecon da pano al la bubetoj. Vi estas de alia raso, vi havas alian animon. Mi jam kredas, ke via venko havigos al ni ĉiuj feliĉon.

Ĉiuj el ni silentis kun emocio. Kiam ni ekmarŝis el la vilaĝo, ĉe la ŝoseo staris la maljunulo, kiu entuziasme kriis: —Vivu la Respubliko!

EN ORIENTO FURIOZAS LA SAMA MALAMIKO!

Rekia popolfronta informilo, pri tio, estas la tre interesa gazeto

ĈINIO HURLAS

PER ESPERANTO POR LA LIBERECO DE ĈINIO

Aperas 5 - foje en monato.
Abonprezo: 4 respondkuponoj
por 10 sinsekvaj kajeroj.

Adreso: MR. A. GRIVEN
N.º 14, Lane 169, Carter Road
SHANGHAI (Ĉinio)

Indiferento al Hispanio, pro erara opinio, estas socia memmortigo!

Ayuntamiento de Madrid

LA ESTRO DE LA REGISTARO DIRIS...

Doktoro Negrin, fama kuracisto, fervora socialisto k digna estro de la Registaro, antaŭ kelkaj tagoj, en Madrido, per radio, sin turnis al ĉiuj hispanoj k al ĉiuj demokrataj civitanoj de la mondo per meditando vortoj, en sobra parolado el kiu ni prezentas interesan fragmenton por la internacia legantaro.

En la komenco de la dua vintra kampanjo, nur unu solan aserton mi volas fari, je nomo de la Registaro: NI VENKOS! la Respubliko triumfos, k certe la teruraj suferoj el tiu ĉi milito, kiun oni trudis al ni, ŝajnos malgrandaj en komparo kun la gajno de profundaj rezultatoj. Je nomo de la Registaro, antaŭ la kruda vero de la tragedio, oni ne povas — mi ne povas! — diri mensogajn vortojn. Ni venkos! jes, sed la triumfo venos al ni malseka je sango k larmoj, kiel venas al manoj de venkintoj ĉiuj venkoj akiritaj per armiloj. Pri tio kulpas tiuj, kiuj perfide provokis al la Respubliko k tre kruele puŝis la popolon en teruran militon, kiu estus malaperinta, du monatojn post la eksplodo, se la hipokrita kunlaboro unue, k la cinika interveno poste, ne ŝveligus la internan konflikton je internacia dangerego. Du fremdaj nacioj, kun rikanoj k moko, pruvas la detruan potencon de sia militmaterialo sur la vertebroj de Hispanio k ekzercas siajn soldatojn, tra la amplekso de nia teritorio, por futuraj atakoj al aliaj najbaraj ŝtatoj; hipoteckante samtempe, kun identa celo, la ĉefajn naturajn trezorojn de nia nacio.

Batoj, renversoj k ĉagrenoj ĉiam renkontos nin firmaj k serenaj. La nepra bezono de nia venko estas nia forto. Nur tio gravas! Nur validas la finvenka rezultato, k pri tiu punkto konkreta ni ne akceptas dubojn. Ni prezentis al la oficiala mondo niajn plendojn; tiu supera reduktita mondo ne ŝatis akcepti nian pledon laŭ ĝustaj konturoj. La diplomataro zorge klopodis deformi la karakteron de nia postulo. Tiamaniere, nia sincera apelacio, al la konscienco de ĉiuj popoloj k de ĉiuj registaroj, alarma voko rajtigita per krioj de miloj da infanoj k virinoj, murditaj de la germana aviadilaro k de la itala artilerio, transformiĝis en naŭziga spekulado ĉirkaŭ la marĉanda interpretado de velkintaj artikoloj en kontrakto, kiu se en Ĝenevo estas ĉifita papero, en Hispanio ĝi estas karno masakrita.

Hispanio akceptos volonte ĉiun klopodon celantan redukti la militon laŭ interna afero; sed la demokratioj devas eviti resti viktimoj de trivialaj trompoj de fripona makiavelismo de siaj ruzaj malamikoj. Ni petas nur la aplikon de la leĝo! Estas jam senutile kripli niajn rajtojn per falsaj promesoj. La diplomatio, kulpa pri la dangera evoluo de nia konflikto, devas ŝpari la komplimentojn, kiam ĝi liveras al ni siajn kondolencojn pro niaj suferoj. Ni ja malŝatas la ploreman kompaton ĉar tio, anstataŭ solvo, estas ofendo por la justeco. Tamen, estas nun mia devo esprimi ĉi tie, en Madrido, sukoplana medolo de la hispana heroeco, mian dankon plej koran por la popoloj, kiuj stimulas nin, per senkondiĉa helpe, daŭrigi la lukton ĝis la fino. Fidelaj ni estos al tiu normo, sen hezito eĉ en la bordo de la tombol Tial niaj fiaskoj neniam skuas nian fidon. Neniam! Tial neniel ni kaŝas la dornojn. Nia epopeo povas svingi venkojn k konfesi malvenkojn. Tra la fluo de tio aŭ alio, ni eliras sperton k akiras forton de spirito, kiel necesan garantion por sekure rigardi la estonton. Nenia lando, subite devigata fari militon, povis ne kalkuli pri faloj k venkoj. Perdoj kun doloro k venkoj sen ĝuo; doloro pro fiasko, ĉar tio estas doloro de Hispanio, sed venkoj sen plaĉo pro tio ke neniam ni volas hisi la flagon de nia entuziasmo sur iu martira peco de nia lando, kie la milito buĉis homojn k detruis domojn. Nia Respubliko ne batalas egoisme por asekuri la pacon sur parto de Hispanio aŭ nur por kelkaj hispanoj; ho, nel ĝi pretendas ion pli noblan: venki por la tuta popolo, venkante samtempe por ĉiuj homoj de la mondo, dignaj k honestaj. Tio estas nia plej delikata zorgo k nia plej intima gloro!

MOBILIZO DE VIRINOJ

Sur gluaĉa deklivo de tuteca politiko, la perfidestro Franko diktis strangan ordonon, sub formo de bombasta dekreto, per kiu li mobilizas ĉiujn virinojn ĉe la «naciista» zono, en aĝo de 18 ĝis 40 jaroj. Per emfaza antaŭparolo, oni klarigas, ke la celo de la mobilizo estas «komplezi» la virinojn k utiligi iliajn servojn en ĉiu ajn speciala laboro, profitebla el ili.

Nu, bone; antaŭ kelkaj tagoj, en suda urbeto tre proksima al Gibraltaro, efektiviĝis, unuan fojon, la oficiala ofendo. Amasigitaj en tri ŝarĝaŭtomobiloj foriris al nekonata celo la unuaj, tiel triviale mobilizitaj, malfeliĉaj virinoj. La adiaŭo de iliaj maljunaj familianoj bildigis angorajn scenojn. Baro el homamaso, plende densiĝinta ĉirkaŭ la veturiloj, estis senkompatate disigita per kavaleriaj faŝistaj gvardistoj. Tiu freŝa metodo pruvas, ke la faŝismo jam sen brido ŝiras eĉ la ŝajnojn de sia propra bluf: Jen cinika ekspluatado de la virina forto per hontiga ukazo forprenanta, el mizeraj hejmoj, la bedaŭrindulinon, kiuj eble jam perdis la edzon, la patron, la filojn aŭ la fratojn. Al tiu kruela abomena eluzo de virina varo, ne mankas la pia beno de kelkaj episkopoj, kiuj por flati servute la tiranon profanas bigote la serenajn figuron de Tiu, kiu naskiĝinte, laŭ ili, el virgino pardonis eĉ la pekantinojn nur pro ilia virineco...

La kruda sciigo venanta lakone el Gibraltaro tremigas la historiojn de ĉiuj dignaj hispanoj. Sed la meĥanika livero de virinoj en misteran direkton, laŭ «registara» ordono, kiel prologo de vasta k monstra ĉasado, devas fermigi la pugnojn, pro sankta kolero, de ĉiuj viroj de la mondo por ke ili mem ne suferu iam la honton, kiun nun la hispanoj glutas.


Tradicio, Ordo, Prospero, Patrio, Familio... ho, kia blasfemo: Tiranio kun ĉifonoj el purpuro! Despotismo sen vualoj, sen artifiko, sen timo jam al la sentimentalaj reagoj de la universala opinio, tiu mistera sfinkso, obstine kvieta, ankaŭ antaŭ la fuŝa spektaklo de tiu karavano da virinoj, devigataj fari ion pli utilan, por la faŝismo, ol plori pri siaj parencoj, murditaj pro amo al libero aŭ falintaj, en la sklavecaj frontoj, defendante la malamikajn interesojn pro angoro forkuri al la popolaj tranĉeoj dangurigante tiel la familianojn, kiuj tamen nun veturas perforte al iu nekonata celo...

Ayuntamiento de Madrid


KRISTANA OPINIO

En Usono, 150 protestantaj pastroj subskribis publikan leteron per kiu estas kondamnata la konduto de hispanaj faŝistaj episkopoj. Ili deklaras: «La intereso de hispanaj pastroj justigi la militan ribelon kontraŭ legitima Registaro, estas alarma fakto k montras malamajn sentojn al popola regado, al la konscienca libero, k ankaŭ al la principoj, kiujn ni, amerikanoj, profunde amas.» «La episkopoj nenion mencias pri la partopreno de Italio, Germanio k la maŭroj, favore al perfidulo Franko.» «Tiu konflikto estas lukto inter demokrataj fortoj k socia progreso, je unu flanko, k la privilegiita klaso k la faŝistoj, en la alia flanko.» «Estas bedaŭrinde, ke la episkopoj fariĝu ĉampionoj de reakcio k faŝismo.» «Estas malfacile al ni kredi, ke tiu letero montras la veran sintenon de katolika Eklezio rilate al faŝista invado de la respubliko Hispanio. Tiuj pastroj certe ne gajnos simpatian en Usono post tiu arbitra deklaro, per kiu ili traktas kun malŝato la principojn, kiuj estas amata posedaĵo de usona popolo.»

MARA HISTORieto DEDIĈITA SEN MALICO AL LA BRITA ESKADRO



La reĝino de la maro



riskas perdi la sceptron



spite al akordo de Nyon



pro la blufado de London'

MI AKUZAS!

(De Vernon Bartlett. Aperinta en «The News Chronicle»)

Jen nova kritiko, pri Anglio, verkita rekte de angla plumo. En ĉi tiu artikolo, la sagoj de la riproĉo celas la altajn kapojn de la Brita Registaro. Estas agrable trovi eksteran voĉon, kiu pravigas niajn plendojn. La enhavo estas leginda.

Antaŭ dek kvin monatoj eksplodis civilmilito en Hispanio. Dek kvin tagojn post ĝia komenco, tri italaj aeroplanoj armitaj terenfalas en Alĝerio, kiam ili flugis helpe al Franko. La aviadistoj, deklarante antaŭ la franca komisaro diris, ke oni ordonis al ili forflugi, tri tagojn antaŭ la ekribelo. Tiam oni pretekstis, ke Sovetio pretendis starigi komunistan ŝtaton en Hispanio.

Ok semajnojn poste, mi vojaĝis al Hispanio k vizitis ĉefajn urbojn. Dum mia vojaĝo mi renkontis unu solan ruson (la ambasadoron de Sovetio) eble du, ĉar lia sekretario ŝajne ne estis hispano.

La malmultaj aviadistoj, kiuj defendis Madridon disponis nur pri malnovaj aparatoj, dum Franko posedis grandan nombron da modernaj aviadiloj germanaj k italaj. La registaraĵoj devis lukti kontraŭ tiom da malfacilaĵoj, ke el sep pilotoj, kun kiuj mi konatiĝis, tri mortis k du vundiĝis dum nur unu semajno.

En la hispana Registaro, kontraŭ kiu tiel rapide intervenis Italio k Germanio, ne sidis eĉ unu sola ministro socialista. La balotado, kiu kondukis ĝin al estreco, okazis sub regado de alia registaro, laŭtendence konservativa.

La angla registaro adoptis tuj la politikon pri Ne-Interveno. Ĝi konsideris tion tiel urĝa, ke ĝi prenis unuflankajn mezurojn k ĝi estis la unua, kiu malpermesis siajn regatojn k siajn ŝipojn helpi iel ajn la hispanan popolon. Tamen, Hispanio estas sola lando en la mondo, en kies Konstitucio ekzistas formala akcepto de la Kontrakto de la Ligo de la Nacioj. Hispanio ĉiam deklaris, esti preta akcepti iun ajn decidon, kiun adoptus la Ligo.

Dum unu jaro de tiel nomata Ne-Interveno, ĉiuj membroj de la Brita Registaro sciis, ke Italio k Germanio intervenis fakte en Hispanio. Absolute ne gravas ĉu la ideo pri tiu politiko naskiĝis en Parizo aŭ en Londono.

Ni restis volonte surdaj pri la dignaj alvokoj de la hispana Registaro, kiu tute ne petis, ke ni subtenu ĝin aktive, sed ke almenaŭ oni rajtigu ĝin aĉeti—kun granda profito por niaj armilfabrikistoj—tiujn nepre bezonatajn elementojn por ĝia memdefendo.

Jam de monatoj, Mussolini k Hitler eĉ ne kaŝas sian malrespekton al la kompromisoj, kiujn ili subskribis por ne interveni en la hispanan militon. Ĝuste, ili fanfaronas pri la mal!

La fortoj de ambaŭ ŝtatoj, agantaj en Hispanio, eble ne atingas pli grandan kvanton ol cent mil homoj (*); sed teknikistoj, artileriistoj k aviadistoj en la «naciista»

kampo, estas ĉiuj germanaj k italaj. Malgraŭ tio k spite al la ekzistantaj pruvoj, oni alprenis nenian decidon.

Lastatempe, la danĝero pri tio, ke Francio k Britio ne povos komuniki tra la Mediteraneo kun siaj transmaraj kolonioj, evidentiĝis tiel, ke la timo pelis al la agado. Oni kunvokis la Konferencon de Nyon, kiu finiĝis rapide k sukcese ĉar oni lasis ekstere la atencintojn. Sed post dek kvin tagoj, oni detruis la efikon de la Interkonsento per invito al la atakantaj landoj aliĝi al la kontraŭpirata formulo.

La rifuzo flanke de Italio pri retiriĝo al la «volontuloj» en Hispanio, povis doni esperon pri tuja agado. Almenaŭ la Pirenea barilo, inter Hispanio k la cetera Eŭropo, estus forigita k sekve, la hispana registaro povus havigi al si la armilojn, kiujn oni devus jam provizi al ĝi antaŭ pli ol unu jaro.

Refoje estiĝas hezitemo pri malfermo de tiu landlimo, kio evitus, ke la Ne-Interveno plue estus farso. Intertempe, la hispanoj atendas senespere, dum novaj ekspedoj de militmaterialo k homoj alvenas al armeoj germana k itala, kiuj batalas en Hispanio.

Dum la milito inter Italio k Abisenio, oni asertis en Anglio, ke ne necesis adopti drastajn mezurojn urĝe, ĉar ĝis forpaso de almenaŭ unu plia jaro, Italio ne povus venki. La rezulto estas, ke Abisenio estis subjugata pere de aeroplanoj k de la venengasoj. Same oni diras nun pri Hispanio k povas esti, ke ni agnoskos nian eraron, kiam la hispana popolo estos devigata akcepti, ke la germana k la itala ŝtato estas pli malmola ol la karno de la vinoj, virinoj k infanoj de Hispanio.

Ni, anglaj homoj de la strato, malhavas influon k intelektan subtilecon. Ni komprenas, ke la membroj de la Registaro devas prizorgi gravajn aferojn, sed ni devas savi niajn filojn el la terura k neutila buĉado, kiu efektiviĝas nun en Hispanio k Ĉinio.

NI POVAS STARIGI FINE JENAJN ASERTOJN

Unue.—Ke neniam iu apaĉo ŝanĝis sian konduton, se li vidis timigitaj la personojn, kiujn li mem timis alfronti.

Due.—Ke Italio, kun unu armeo en Abisenio, alia en Hispanio k alia en Libio, ne povas alfronti la Britan Imperion.

Trie.—Ke se Italio luktus, kun la posta helpo de Germanio, la publika opinio en nia lando kuniĝus eĉ pli spontanee ol en jaro 1914. komprenante, ke ankoraŭ restas io deca, por kio batali.

Kvare.—Kvare se la Demokratio ne akceptas esti sentema, antaŭ alies siniferoj, perfidas la subskribitajn kompromisojn por masoni kolektivajn reĝimon, kiu kompensus la perdojn de la lasta milito, la ekzisto de tiu vorto ne estus pravigita.

Kvine.—Ke la homoj, kiuj perfidas la veran signifon de Demokratio k subtenas alian politikon, meritas la plej profundan malŝaton de ĉiu prudenta persono.

(*) Oficiale, la hispana registaro fiksis la nombron da cent dek mil, «nur por la Italaj soldatoj» (Redakcio).

VOÇO DE TRANÇEO

Post dumonata restado en la tranĉeoj, kiam, iom elĉerpitaj, ni estis anstataŭitaj por pasigi kelkajn tagojn en proksima postfronta vilaĝo; troviĝante mia Brigado en festa kunveno, omaĝe al ĝi okazanta, eksonis subite, mallonga k klara, la voĉo de l' devo; k ni ĉiuj, elĉerpitaj pro plurmonata loĝado en tranĉeo, antaŭ la voko de la devo, instinkte stariĝis k, sen plendoj, sen acidaj vizaĝoj, sen elmonro de malkonformeco, forlasis la feston k energie eliris de la teatro. Enmeze de l' strato vilaĝa, eltenante pluvadon, kiu torente faladis ni ĉiuj viciĝis tre rapide komandataj de niaj kamaradoj militestroj, k ekmarŝis oni ne sciis kien, sed ja por kio: Ni aliris kien la devo ĵus vokis nin!

Eble, rigardite nur supraĝe, tio povas havi nenian valoron; sed profunde serĉante la sencon, kiun reprezentas la rapidaj naturaj ekagoj, oni povas kompreni, per tiu simpla epizodo, la temperamenton de niaj batalantoj, de niaj popolfrontaj antifaŝistaj soldatoj. Ili estas forĝitaj jam en la batalo; oni povus diri ke ili estis jam faritaj por la batalo; eĉ ke ili ne plu povos vivi jam sen batalo, dume en la mondo ekzistos du kategorioj de homoj: ekspluatantoj k ekspluatatoj; ĉionhavantoj k nenionhavantoj!

Pro tio, kiam la pafoj de kanonoj, la eksplodoj de bomboj, la krakado de mitraliloj, la eĥoj ĉiaj de la batalado ne muĝas en iliaj oreloj, aŭ la priokupado de la travivata milito ne elplenigas ilian menson, eble ili povas estigi tiam malgrandajn problemojn inter si, kiel filoj de unu el la plej ribelemaj k liberecemaj popoloj, kiu dum jarcentoj vivis katenita k nun ne ankoraŭ adaptiĝis al la nova vivformo, kiun ĝi nun ĝuas depost la 19. de Julio. Eble do, pro ĉi tiuj psikologiaj faktoroj, iuj kamaradoj, precipe el eksterlando, povas pensi, ke la hispana popolo ne luktas unuecfrente. Tiujn amikojn mi invitus veni k vidi ĉi tiujn soldatojn el plej divers-tendencaj partioj k opinioj, ĉiuj unuigintaj, ĉiuj, kun la rido surlipe, forlasantaj la feston honore al ilia kuraĝo k braveco, por marŝi al la batalo, eble al la morto, kantante kantojn antifaŝistajn, jen marksistajn, jen anarkistajn, jen respublikanajn—kio gravas la diferenco?—Kio gravas, por ili, taktikaj diferencoj inter partioj, se ili ĉiuj nur havas unu komunan celon? Kio gravas se mi estas komunisto k vi anarkisto, kiam la Patrio; ho ne ja la Patrio de la riĉuloj, sed la Patrio de la malriĉuloj, kiun nun ni forĝas, estas en danĝero? Nur malamiko de la Socialismo povas aserti, ke ni ne batalas unuecfrente...

Kaj tie perdiĝis, en la mallumeco de la nokto, la lastaj siluetoj de tiuj gigantoj de la Morto, kies nomojn oni ne konas, k oni eĉ ne konas. Tio ne gravas. Kio gravas estas, ke per siaj heroeco k sango ili konstruas novan vivon pli justan k liberan. Permesu do, ke ĉe la sojlo de enigma destino, ni rajtu postuli al tiuj, kiuj rigardas nian batalon de malproksime, kvazaŭ spektaklon, ne plu distingi nin per strangaj alnomoj, kiam ni nur batalas kiel klasfratoj, kiel antifaŝistaj popolfrontanoj ĉar kune ni elverŝas nian sangon, kune ni mortas k kune ni naskas aŭroron de Nova Vivo.

Rikardo RILES

Villanueva del Pardillo 15-10-37.



Se iu lordo parolas malŝate pri nia milito, la angla popolo ne faras tion. Jen simpla k emocia tombo de anglaj volontuloj falintaj, en sektoro najbara al Madrido, defendante la rajtojn de Hispanio k la liberon de la britaj laboristoj

NEUTILA TASKO

Generalo Franko havas fraton, kiu ricevis gravan postenon en faŝista zono k vojaĝis al Nüremberg por ĉeesti kongreson. Nikolao Franko profitis la okazon k konferencis longe kun Julio Streicher, konata estro de nacisocialista distrikto.

Post tiu interparolado, Nikolao Franko deklaris al germana faŝista ĵurnalo, organo de Streicher, jenon: «Mi venis al Germanio, al amika Germanio, por prepari la estontan lukton cele al konkerado de l' animo de la hispana popolo. Niaj politikaj estroj sin inspiras en la normoj de la naciista Germanio k de la faŝista Italio.»

La ĵurnalo aldonas: «Nikolao Franko aljuĝas specialan gravecon al vizito, kiun li faris al Streicher, kies longan sperton li deziras profiti.»

El tio oni konjektas, ke eĉ frato de la perfidestro ja agnoskis en Germanio, ke la hispanaj «naciistoj» ne estas mastroj de hispana animo. Ili aspiras ĝin konkeri, ĉar ili ne ĝin posedas. Ankaŭ li agnoskis, ke necesas lukti por atingi tiun konkeron. Do, la hispana animo sin defendas k rezistas al la malamiko. Hispana animo, tradicie liberema, estas malamiko de faŝista ŝovinismo, de feŭdaj militistoj, de kruelaj rojalistoj k de ĉiuj sovaĝaj invadintoj kun benoj de pastroj sen religio.

Nikolao Franko ne scias, kiamaniere atingi tiun konkeron, nek kiel komenci tiun lukton. Li k lia frato, kun aliaj kunkulpuloj, jam uzis ĉiajn rimedojn, kiajn ili imagis: Jen do individua k amasa murdado, ŝtelado, incendio, perfortigo, enkarcerigo, bombardado al malfermaj urboj k hospitaloj, detruado de artaĵoj, torpedado laŭ germana stilo k per italaj submarenoj, perfidado, hipokrita agado, mensogado k finfine la morala aŭ fizika turmentado...

Nun ili konstatas, ke post ĉio tio, ili estas pli malamegataj ol iam; senlima k muta abomeno envolvas ilin. Eĉ tiuj, kiuj dum la komenco, simpatiis al ili, nun naŭze k kolereme ilin forlasas... Ili estis tiom sovaĝaj, tiom barbaraj, tiom kruelaj, tiom malhumanaj, ke jam ili timigas nenium. En la eblaj viktimoj estas jam elĉerpita la kapablo pri teruro. Kion novan ili povas fari? Ĉu daŭre mortigi? Sed, kiom valoras la vivo, kiam oni vivas vasale sub la jugo de Franko, degenerinta hundo de Hitler k Mussolini?

Certe la hispana animo forflugas el ili, ili nenie lernos ĝin kapti. La homo estas plenlibera en sia interno, malgraŭ ĉiaj eksteraj premoj. La lecionoj de Streicher, tiu sanga histriono, neniel taŭgos. Nikolao Franko reiros al Burgos kun kelkaj formuloj, neaplikablaj al hispana realo; k li kun ili plene fiaskos...

KION VI FARIS POR EVITI TION?

Asturio agonias. Heroa popolo kun okcent mil homoj, el kiuj ankoraŭ granda kvanto rezistas senespere tra pasejoj k fendaĵoj de la montoj, estas jam sieĝe enfermita. En Asturio estis tre pezaj la postuloj de la deo; tie, ĉiu povanta teni armilon partoprenis en la lukto; tie, nur ekzistis unu sola volo: venki aŭ morti! Temas nun pri morto. La blinda k surda mondo decidis tion per sia pasiva aŭ indiferenta konduto. Jes, temas nun pri morto! Kvankam la ministoj de Mieres, la forĝistoj de Trubia k la fiŝkaptistoj de Gijon estas jam kutimaj kolegoj de la eterna mistero, pro sia meĉo k pro sia malavara sindonemo. En glora k sanga kategorio, Asturio okupas la unuan lokon...

Preferinde estas—ili sperte scias tion—fali sen spiro, kun fusilo ĉe la mano, ol resti kun vivo sub la premo de perversaj torturantoj. Tial, kvazaŭ primitivaj gentoj, tiuj obstinaj mirindegaj batalantoj kunportas, en sia fatala retroiro, la imponan k tremantan amasegon de siaj virinoj k de siaj infanoj. Antaŭ la invadinto, la valoj k vilaĝoj dezertiĝas, la loĝantaro forkuras. Kien ili marŝas? al sia destino, al sia apoteozo! Kia grandioza respondo al tiuj fantantaj nenion por savi tiun popolon, kiu povis neniel atendi—nek volis—la indulgon de furioza monstro, kiu signas la vojon per krimoj terure hirtigaj.

Fervora helpanto aŭ flegma observanto: la epilogo en Asturio povas esti la prologo en via lando. Kion vi faris por eviti tion?

MOZAIKO

● Itala registaro oficiale komunikis al ĉiuj landoj, ke italaj «volontuloj» en Hispanio estas nur 40.000, sed eble ili forgesis, ke en la batalo de Gvadalarajo oni kaptis dokumenton kun la teksto de saluto sendita al italaj trupoj, de la Granda Faŝista Konsilantaro. Tiu dokumento, fotografe reproduktita en la Blanka Libro de nia registaro, tekstas jene: «La Granda Faŝista Konsilantaro, sendante saluton al trupoj, kiuj luktas sub la ordonoj de generalo Franko, memoras speciale pri la KVINDEK MIL kamaradoj kiuj, sur la grundo de Hispanio, batalas sub la signo k por la gloro de l' *Littorio*.»

Ni demandas: Ĉu post la 2. de Marto (dato de tiu dokumento) ne venis pluaj «volontuloj»? Kiom da miloj alvenis dum SEP monatoj?

● André Marty diras: «Nun ekzistas (en la respublika Hispanio) armeo de 500.000 soldatoj; la militindustrio estas organizita; la laboristoj laboras kelkafoje je tri cent metroj el la tranĉeoj. La popolo volas gajni la militon k la popolo venkos se ne alvenas novaj «volontulaj» trupoj. La milito povas finiĝi antaŭ unu monato k la paco reveni en Eŭropon, SE LA DIPLOMATARO VOLAS.» Kaj se... la popoloj volas, ni aldonas.

● Nia urba radiostacio dissendis paroladon de kapucena monaĥo Salvador de Hajar, ĵusa forkurinto el faŝista zono, kiu publike sin turnis al ĉiuj hispanoj k al la tuta mondo klarigante kion li vidis en nigra infero k kion li trovis en lojala zono. Interalie, li diris: «Tiuflanke la maŭroj, la germanoj k italoj, kiuj detruas k forrabas Hispanion. Ĉi tie laboranta k digna popolo, kiu ĉiujn respektas, k kiu per ordo k sinifero kreas la fundamenton de la venko, de tiu venko, kiun la popolo volas atingi nepre, por la paco.»


● La aeroplanoj, kiuj servas la komercan linion Stuttgart-Lisboa, de antaŭ kelkaj semajnoj sin dediĉas al spionado, super la francaj postenoj, en Pirinea montaro.

Lastsemajne, la germana aviadilo el tiu linio, kiu ĉirkaŭflugis la francan

postenon de Urrugne, estis avertata k minacata per raketoj.

● Laŭ sciigoj de Napoli, la 14. Oktobro eliris el tiu itala haveno tri komercŝipoj, kiuj transportis 138 oficirojn k 8.000 soldatojn. Oni anoncis oficiale ke ili vojaĝas al Libio, sed kiel ĉiam okazas, sendube ili alvenos post malmultaj tagoj al havenoj de Cadiz aŭ Malago.

● Dum la faŝista aviadilaro bombardis seninterrompe la civilan loĝantaron de la ariergardo, kio klare k trafe montras ĝian kuragon k heroecon, niaj aeroplanoj atakas nur militajn celojn. La 15. de Oktobro, frumatene, niaj aeroplanoj bombardis la



Diferenco de rapideco, en la marŝo, inter faŝismo k diplomatio

faŝistan aviadejon en Garrapinillos (Zaragozo) k detruis pli ol TRIDEK nigrajn aviadilojn. Nia aera eskadro perdis nenion.

● Nia fama k tutmonde konata artisto, la violonĉelisto Paŭlo Casals, kiu lastatempe rifuzis ludi koncerton en Hitlerio, ĵus denove rifuzis inviton de la imperiestro de Japanio, dirante: «Mi ne volas iri al iu ajn faŝista lando.» Dankinda estas la sinteno de Casals, kiu montris rektan vojon por albatali la faŝismon; ĉiel bojkotadi la faŝismon, eĉ per neado de arto!

● Laŭ sciigoj el franca deveno, Nikolao, vojaĝema frato de la ribelinta generalo, ĵus vizitis en Romo al itala diktatoro petante la sendon de 100.000 soldatoj k cent aeroplanoj por organizi grandan ofensivon kontraŭ Madrido. Ni ne scias ĉu Mussolini sendos aŭ ne sendos al Franko tion, kion li deziras, sed ni scias ke Franko ne povos konkerti nian ĉefurbon. Tie ili fiaskos denove.

● El Romo oni sciigas ke Mussolini montris sinceran ĝojon koninte la tekston de paroladoj de s-ro. Chamberlain k s-ro Eden, ĉar en tiuj paroladoj estis agnoskita ke Italio estas la lando vere deziranta, ke la hispana konflikto estu solvata nur de hispanoj.

Koninte tiun sciigon ni vere dubas al kiu el ili ni devas aljuĝi ĉampionecon pri cinikismo, aŭ ŝercemo.

● La franca ministro pri internaj aferoj, s-ro Marx Dormoy kolektis, laŭdire, sufiĉajn pruvojn por aserti ke la atencoj laste okazintaj en franca teritorio estis gvidataj de la «O.V.R.A.» (sekreta itala polico). Tiujn pruvojn oni uzos por la diplomataj diskutadoj.

● La 25. Oktobro du faŝistaj aviadiloj, kiuj intencis bombardi Barcelonon, estis faligitaj de la respublikaj aeroplanoj. La du faligitaj aparatoj estis trimotoraj aeroplanoj el itala marko «Savoia»; ĉiu el ili kunportis kvin aviadistojn (ankaŭ italaj) kiuj pereis.

● Faŝista aviadilo el nekonata itala nacieco bombardis k dronigis la francan militŝipon «Chasseur 91», apud Balearaj insuloj. Dum okazas tiaj atencoj, la fama londona Komitato persiste ne-intervenias.

● Laŭ ordonoj de la nova eklezia ĉefo de Seviljo, kardinalo Segura, la 26. de Oktobro estis ekzekutitaj en Malago 83. framasonoj, respublikaj k liberalaj etburgoj. Por plenumi tiun decidon oni starigis ses eŝafodojn kie ili estis pendigitaj samtempe.

● Pro bombardadoj de faŝista aviadilaro, en Alkala de Henares estas detruitaj valoraj artaĵoj. La Majstra Preĝejo, tiu de Sankta Maria k aliaj artaĵoj, tre valoraj, estas tute rubigitaj. La murtabulo, kiu memorigas la naskiĝon de Cervantes estas dispecigita... k ĉio je la nomo de civilizo k kulturo. Je la nomo de la tradicio!

Esperanto, en Hispanio, nur vivas kaj floras sur la libera parto kie la popolo reĝas!

Ayuntamiento de Madrid

ABONMANIERO

Nia gazeto ne havas fiksan abonprezon. Ĝi eldoniĝas nur per laŭvola individua monhelpo de sia legantaro. Ni elektis tiun sistemon ĉar tiel, ĉiu kroma sumeto de tiuj, kiuj povas pagi iomete plie, ebligas la ricevon de agrabla legaĵo al multaj, kiuj pro senlaboreco, aŭ aliaj kaŭzoj, ne povas pagi sian propran kotizon. Tial, se la enhavo k celo de la revuo estas por vi aprobinda k plaĉa, pagu vian liberan abonon al iu ajn el niaj internaciaj agentejoj:

GENERALA INTERNACIA ADRESO
nur por mono

GUSTAVE FARENC

55, Rue Brise-Pain
Poŝtekkonto 15944 Orleans
ORLEANS (Loiret) FRANCIO

ANGLIO.—K-do O. MELTON.—25 Fowler Str. Nechells, BIRMINGHAM 7

SVEDIO.—ARBETAR ESPERANTISTEN.—Barnhusgatan 8 ö. g. n. b.,
Poŝtgiro n.º 55411, STOCKHOLM

BELGIO.—K-do M. DELFORGE.—35, Rue de Heigne,
Poŝtgiro 199106, CHARLEROI

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA

POPOLA FRONTO — Mar, 25, Valencia (Hispanio)

NEDERLANDA ADRESO
nur por mono de holandanoj

PETRO van der PLANK

Van Speijkstraat, 48-1
poŝtgiro 245542

AMSTERDAM W. Nederlando

NIA MUNICIO

Valencia esperantistaro . . .	36'40	ptoj.
E. R.—Albacete	5	»
E. G.—Somosierra	15	»
A. M.—Bugarra	5	»
A. de F.—Albacete	10	»
F. S.—Albarracín	10	»
J. N.—Fronto Teruel	20	»
J. B.—Barcelona	15	»
E. P.—Hudiksvall	5	sv.kr.
H. R.—Varberg	2'50	»
G. M. B.—Kiruna	2	»
A. Z.—Stockholm	5	»
B. P.—Stockholm	4	»
G. N.—Stockholm	5	»
G. Z.—Stockholm	1	»
Lab. Esp. Klubo.—Malmö . . .	5	»
J. L.—Helsinki	75	f. mk.
N. T.—Helsinki	50	»
G. R.—Lyon	10	flr.
E. S.—Jagerdorf	50	»
P. Z. H.—Svendborg	25	»
R. J.—Chalons s/ Marne . . .	5	»
P. S.—Narbonne	10	»
J. C.—Villeneuve le Roi . . .	10	»
R.—Paris	10	»
K. N.—Paris	20	»
E. B.—Paris	25	»
K. B.—Paris	5	»
M. T.—Fez	10	»
P.—Wien	89'90	»
G. J. W.—Den Haag	1	gd.
A. de K.—Gonda	0'50	»
FLE Sekcio.—Krimpeaan den Ysel	1'50	»
D. v. d. K.—Amsterdam . . .	1	»
J. E. T.—Leek	1	»
FLE Sekcio.—Schiedam . . .	5	»
J. P.—Breezand	10	»
B. H. L.—Rotterdam	5	»

KORESPONDADO

Simpla trilinea anonceto 4 f. fr.

SOVETIO.—K-do Lisikovu Valerij, poste restante, Voronej, dez. kor. kun proletaj esperantistoj en Hispanio, k interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn, plakatojn, ktp.

LA REGISTARO TRANSLOKIĜAS

La Registaro ĵus decidis translokiĝi al Barcelono kun la celo gvidi pli efike la militon, uzante la bonegan industrion de Katalunio, en kunlaboro kun la sindikatoj k Generalitato. La eksterlanda opinio komprenos la motivaĵon, kiu pravigas la ŝanĝon de sidejo, ĉar la supera stabo de la popola lukto por ĉies libero devas resti tie, kie ĝi povas pli utile defendi la komunajn interesojn. La popolfronta Registaro estis honora gasto de Valencio dum unu jaro. Nia urbo adiaŭas ĝin kun la sama respekto ol ĝin akceptis dum la danĝeraj tagoj de pasintjara Novembro. Nun, feliĉe, la cirkonstancoj ne estas la samaj. Barcelono certe estos pli adekvata kadro por la tutpopola ministraro de la antifaŝista Respubliko de Hispanio.

NEK PER LETERO...

Jes; nek per letero volas Egiptio havi rilatojn kun la hispanaj perfiduloj. La ĝenerala Poŝta Administracio de Egiptio komunikis oficiale, ke estas interrompitaj la poŝtaj rilatoj kun la ribeluloj, ĉar nur la legitima Registaro rajtas eldoni poŝtmarkojn k reguligi la poŝtajn servojn kun la ekstero. Tiu simpla decido de modesta popolo estas bona spegulo por aliaj landoj, kiuj tro rapide agnoskis en tiu fako, la perfidan ribelon kontraŭ la libero de digna popolo.

AMIKOJ EL NEDERLANDO!

K-do Nieuwenhuizen, Laakhof, 37, Hago, zorgas nun pri nova monokolekto por nia gazeto. Ĉiuj niaj legantoj en Nederlando devas sukcesi la klopodojn ĉar por vivi oni ne nur manĝas unu fojon...

Estus al ni tre domage haltigi la ekspedon al tiuj, kiuj, eble pro forgeso, ankoraŭ pagis eĉ nek unu cendon. Ayuntamiento de Madrid

POPOLFRONTA LETERUJO

J. A.—Moskvo.—Pri via peto per letero 11-9-937, ni provas komplezi vin, sendante ĝin al la koncerna organizo, sed neeble estis por la dato, kiun vi fiksis.

J. C.—Plonguernau.—Dankante vian monsendon, ni bedaŭras, ke vi akceptis bonfideme senpravajn onidirojn. Espereble via opinio aliĝos per pli funda lernado de la afero. Estu singarda, kamarado!

B. P.—Moskvo.—Vere emociiga estas via frata letero... sed naive vi esperas, ke bojkotado al japanaj varoj etendiĝu al tiuj de niaj atakantoj. Komprenu, kamarado, ke la homecaj sentoj, por la ĉinoj, en kelkaj personoj, estas sekvo de imperiaj intereso. Ni provos havigi al vi la menditan libron.

N. V.—Kirovskoje.—Ni aranĝas la aferon por ke via letero trafu k don. L. Renn, kiel eble plej baldaŭ.

F. L. W.—Los Angeles.—Dankon pro via estimata letero k plaĉaj novaĵoj. Ni tuj skribis p. k. al la knabo, kies adreson vi donis al ni.

H. A.—Lamnemezan.—Viajn klopodojn ni alte taksas k ni notis la adreson de la nova ricevonto de «P. F.»

P. G.—Antwerpen.—Kun danko ni konfirmas la ricevon de via ŝatata letero, kies enhavon ni bone notis por plenumi laŭeble vian peton.

A. de V.—Sparndam.—Vian leteron de 6-10-937 ni ricevis. Kun danko ni notas ĝian enhavon, kiun ni certe ne forgesos. Pri via batalanta amiko ni enketas en la koncerna rubriko. Se ni atingas respondon, vi ĝin legos samloke.

Al kelkaj.—K-do Hernandez estas nun tre okupata, li ŝuldas leteron al kelkaj amikoj, kiuj certe havos paciencon k pardonos la prokraston. Li ne forgesas ilin.

N. K.—Helsinki.—Via letero de 11-10-937 bone alvenis. Ni notas k kvitancajn laŭ via deziro. Ni dankegas viajn klopodojn favore al nia afero. Tio instigas nin al la tasko!

INFORMEJO**ONI INFORMAS, KE**

K-do Evelecio Urbaneja estas kapitano en la Popola Armeo. Lia adreso estas: Capitán Jefe del 4.º Batallón, 121 Brigada, 26 División, Ejército de Este, FARLETE (Aragón).

K-do Jozefo Molina Bolinches, de Alfara de Algimia (Valencia) estas nun en la Armeo. Lia adreso: Estado Mayor de la 39.ª División del XIII Cuerpo de Ejército, CEDRILLAS (Teruel), Hispanio.

ONI SCIVOLAS pri:

K-do Franz Haiderer, aŭstra batalanto en Internacia Brigado. Artileriisto ĉe baterio Thaelman.

K-do W. H. van Praam, nederlanda batalanto, kiu lastatempe loĝis en VILLATOBAS (Toledo).

K-do Francisco Gorgues, kiu loĝinta en Barcelono dum 1928 lasis korespondadi kun k-ino Dora el Polujo.

Presejo de J. Olmos, Alicante, 33, Valencia